

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

<http://satesperanto.free.fr> \*\*\* retadreso: [satesperanto@free.fr](mailto:satesperanto@free.fr)




Foto: Gattin Nenad+

Januaro 2005 76-a jaro, n-ro 1 (1195)

MENSUEL / MONATA

ISSN 1163.0442 Prezo: 5 €



9 771163 044279

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

## El la redaktejo...

Karaj,  
ni eniris en la novan jaron 2005 esperante ke ĝi estos pli bona, pli paca kaj pli kuraĝiga ol la antaŭa. La saman esperon ni havas pri la evoluo de nia kara asocio. Ĝia prospero ĉefe dependas de vi ĉiuj. Do, post la festoj kaj senlaboraj tagoj, ek al la agado.



Bonvolu tuj aliĝi al la kongreso ĉar la plej favora periodo finiĝas fine de januaro. Nun vi nur aliĝu kaj poste vi mendos la loĝadon, manĝojn kaj ekskursojn. Ni faru ĉion por ke nia kongreso estu kiel eble plej sukcesa.

Krome kion diri alian: varbu, varbu, varbu!!! - ĉar por efike aktivi ni bezonas niajn membrojn.

Kamaradece al ĉiuj,

via Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.

Retadreso: satesperanto@free.fr.

TTT-paĝoj:

<http://www.sat-esperanto.org>

Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registriilo.

Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN: FR 77 30041 00001 0123422K020 39

BIC: PSSRFRPPPAR

Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.

Ĉefredaktoro: Kreŝimir Barkoviĉ

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.

□

Imprimé par: EDRB, 7 rue Marie Pia, FR-91480 Quincy-sous-Senart.

Aperas monate - Mensuel.

Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER

Abonnement annuel/jara abono France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399

Limdato por ricevo de kontribuajtoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

# Irassyaimase !

(japane : bonvenon!)

## aŭ Tinĉjo en Japanio.

*Post invito de la SAT-membroj el Japanio, mi vizitis inter la 11-a de oktobro kaj la 2-a de novembro la landon de la supreniranta suno. Miaj spertoj kaj impresoj povas interesi ankaŭ aliajn homojn, tial mi verkis ĉi tiun vojaĝ-raporton.*

*Tinĉjo estas figuro el belga bildrakonto kiu, kiel ĵurnalisto, serĉis la veron.*

Pri Marjorie Boulton mi pensis kiam mi staris en la terminalo de la Brusela flughaveno, la 11-an de oktobro 2004. Estis iom post la 8-a matene kaj mi atendis la aviadilon kiu transportos min al Vieno kaj de Vieno al Kansai-Internacia Flughaveno en Oosaka kie, se la dioj kaj diabloj bonhumoras atendos min Tahira Masako.

Dum la tempo kiam mi estis prezidanto de "La Verda Stelo", la loka Eo-klubo en Antverpeno, prelegis iam Marjorie Boulton. Mi bone memoras ke ni babilis dum vespermanĝo pri nia timo vojaĝi, precipe kiam temis pri vojaĝoj ekster propra vilaĝo. Vojaĝi aviadile, trajne, aŭtobuse kaj ... nu ja, simple esti for de la propra nesto, Marjorie kaj mi estas kvazaŭ ĝemeloj kiam temas forlasi la propran hejmon. La ŝvitado, la nervozeco, la seka buŝo, pri ĉiuj tiuj aferoj mi parolis kun Marjorie kaj pro tio mi pensis pri ŝi.



*Masakato en trajno direkte al Kyoto*

Ekzakte laŭ antaŭvidita tempo la granda birdo flugis kun mi en la stomako al Vieno. Nenio grava okazis kaj la aviadilo taksiiis sen iu damaĝo ĉe terminalo de la Aŭstria flughaveno. Rapide mi sendis mallongan mesaĝon al mia edzino ke mi daŭre vivas kaj bonfartas.

Promenado tra la flughaveno de iom pli ol 15 minutoj direktis min al la lokalo kie jam sidis, atendante la aviadilon por Oosaka, dekoj da japanoj. Ĉiuj bonhumoraj kaj gajaj, imagu. 11 horojn kaj 40 minutojn bezonas la aviadilo por flugi kun ĉi tiuj afablaj homoj kaj mi al Japanio. Kредu aŭ ne, sed ankaŭ ĉi tiu flugo estis sukcesa. Mankis en la aviadilo spaco por la kruroj, pro la fakto ke iu germano nepre volis meti la seĝon tiel ke li komforte povis dormi. Ke pro tio restas por mi neniu loko por miaj kruroj, lasis lin tute indiferenta. Mi ne sciis ĉu ĉi tiu ago de la germana samklasano estis la lasta ĝeno kiun mi

daŭrigo paĝo 12

### ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la CD en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx = ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

# Dek motivoj por rifuzi la projekton de traktato pri Eŭropa Konstitucio

(Originala titolo de la artikolo:

“Dix sujets qui fâchent” = Dek temoj, kiuj kolerigas)

El eksterseria numero de “L’Humanité” (Oktoebro 2004), artikolo de Thomas Lemahieu tradukita de Petro Levi.

## 1. Libera cirkulado de la kapitaloj.

Ekstreme malutila, tiu regulo estas tiel esenca en la “konstitucia” traktato, ke krom en la partoj I kaj III ghi ĉeestas eĉ en la antaŭparolo de la “ĉarto de la fundamentaj rajtoj de la Unuiĝo”. Tiu fantomo de la “libera cirkulado de la kapitaloj” obsedas tra la tuta projekto de konstitucia traktato kaj surbaze de tiu konstato oni povas paroli pri “konstituciigo” de la liberalismo en Eŭropo! Sub la premo de tiu absoluta postulo, kion do valoras la deklaroj de intencoj, apenaŭ aluditaj sed neniam devigaj, kiel tiu “sociala merkatekonomio altnivele konkurkapabla, kiu tendencas al la plena okupo kaj al la socia progreso” (I-3-3)? Eĉ la eŭropa Parlamento - alivorte, la deputitoj elektitaj de la popoloj - ricevas la ordonon “realigi kiel eble plej vaste” tiun liberan cirkuladon de la kapitaloj (III-157-2) kaj tial havas la devon partopreni en la vetkuro pri la translokigoj de entreprenoj, en la rekta instigo serĉadi la plej “allogajn” zonojn por la kapitaloj, tiujn, kie oni povas malsupren tiri la salajrojn kaj la rajtojn. Plej malbone: por malebligi ĉian estontan ekonomian alternativon, la “konstitucia” traktato iras ankoraŭ pli malproksimen, pretendante tutsimple “malpermesi” la “limigojn al kapitalmovoj” (III-156); tio konkrete signifas anticipi malebligi ĉian efektivigon de ia ajn imposto (el la tipo de Tobin’a takso) pri la financaj transakcioj aŭ de rimedoj celantaj lukti kontraŭ la industriaj translokigoj sen uzo de la perversaj armiloj de la fiska kaj socia dumpingo. Fine, por starigi rimedojn, kiuj konsistigus, laŭ la “konstitucia” traktato, “regreson en la juro de la Unuiĝo” favora al la “liberaligo de la kapitalmovoj”, la Konsilio de la 25-landa Eŭropo devus unuanime decidi. Dank’al tio, sufiĉa estos la

kontraŭstaro de unu lando por ebligi al la libere moviĝantaj kapitaloj, ke ili daŭrigu transformi Eŭropon en ĝangalon.

## 2. Konkurencio “libera kaj ne falsita”.

Iomete ŝminkita en la parto I (kun, ekzemple, laŭdindaj sed nur sorĉkantaj alvokoj al “socia” merkatekonomio, al “libera kaj justa komerco” aŭ ankoraŭ al “daŭra disvolviĝo”), sed senigita je tiu falsa diskretemo en la parto III, la temo pri “merkatekonomio”, “malfermita”, “altnivele konkurkapabla”, kie la “konkurencio estas libera kaj ne falsita” saturas la tutan projekton de Konstitucio. En tiuj kondiĉoj, se tiu traktato estus alprenota, la eŭropa Unuiĝo realigus la antikvan utopion de la plej radikalaj liberalistoj: meti la kapitalismon plejparte ekster la povon de la leĝofaranto kaj forpreni la ekonomion for de la politika respondeco. Laŭlonge de la traktato, kiam ili ne tute simple malpermesas ĝin, dekoj da aranĝoj draste subordigas la politikan “reguladon” al la postuloj de la libera interŝanĝo kaj de la malfermiteco de la merkatoj. Ekzemple, kiam temas pri “socia politiko”, “la Unuiĝo kaj la membroŝtatoj agas kun konsidero pri la neceso konservi la konkurkapablon de la ekonomio de la Unuiĝo” (III-209), aŭ, pri la entreprenoj, nepre necesas eviti administraciajn, financajn kaj jurajn trudojn, kiuj povus ĝeni la kreon de malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj” (III-210-2-b). Kaj, malofte, kiam la traktato kuraĝigas la politikan “intervenon” de la ŝtatoj, tion ĝi faras por enprofundiĝi en la liberaligon: “La membroŝtatoj penas por efektivigi la liberaligon de la servoj trans la nivelon de la devigo, se la ĝenerala ekonomio kaj la situacio de la koncerna sektoro tion



ebligas” (III-148).

## 3. La publikaj servoj kiel pafcelo.

Naĝanta en la bano de “libera kaj ne falsita konkurencio”, la “konstitucia” traktato estas en regreso pri la publikaj servoj, rilate al la traktato de Nico. Ĝi enkorpiĝas nek en la “valoroj” (I-2) nek en la “celoj” (I-3) de eŭropa Unuiĝo la principon de “publika servo”. Ĝi konceptas tion, kion ĝi nomas “servoj de ĝenerala ekonomia intereso”, kiel esceptojn tolereblajn, sed sub rigoraj kondiĉoj. Atentu tiuj, kiuj “trouzus” publikajn servojn! Ili estas “submetitaj al la reguloj de la konkurencio” (III-166-2) kaj “krom ne en okazo de escepto”, la “helpoj konsentitaj de la membroŝtatoj aŭ pere de ŝtatrimedoj sub kiu ajn formo falsanta aŭ minacanta falsi la konkurencon” estas “nekongruaj kun la interna merkato” (III-167-1) kaj do malpermesataj. Ni notu, plie, ke la eŭropa direktivo pri la servoj de ĝenerala ekonomia intereso, kiu principe difinas la “eŭropan leĝon”, al kiu la “konstitucia” traktato resendas, ŝajnas pli ol iam ajn implikata de la Komisiono. Dum tio la direktivo pri la liberaligo de la servoj (t.n. “de Bolkestein”) estas impulsegata kontraŭ la eŭropa socia modelo kaj rangas antaŭ ĉia stabila difino de la nocio de “publika servo” (aŭ de “servo de ĝenerala ekonomia intereso”) ĉe la nivelo de la Unuiĝo: krom la servoj jam traktitaj de alia direktivo - kaj tial jam disponitaj al la merkato - (transportoj, financaj servoj kaj telekomunikoj) kaj krom tiuj, kiujn jam senpage kaj rekte liveras publikaj instancoj - admiru tiun striktegan koncepton pri publika servo -, ĉiuj servoj submetiĝos al la direktivo “de Bolkestein”, inkluzive la edukadon, la kulturon kaj eĉ la sanon.

## 4. La mona sistemo kiel ŝlosilŝtono.

Lastmomente, pro insista peto de la eŭropa centra Banko (ECB), la eŭropa Konsilio aldonis “la stabilecon de